

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto:
vers une culture sociale
sans frontières.*



*La Turo «LU» («Loko Unika»)
en Nanto
sur la loko de la inta biskvit-
fabriko «LU»
(«Lefevre Utile»)...*



*...kies pra-reklamo
postvivas ĉe muro en
Trentemulto...*

(Pri ĝi, vidu artikolon p.2)



Ĉirkaŭ l' kongresurbo...

P

En la regiono de l' 69a SAT-Amikara kongreso Trentemulto (*Trentemoult*)



Trentemulto, ĉarma vilaĝo, antaŭe estis vilaĝo de fiŝkaptistoj kaj ŝipkonstruistoj. Ĝi situas en la komunumo *Rezé*, sur la maldekstra bordo de la riverego Luaro.

En 397, Duko de Bretonio, *Jean la 5a*, atribuis al la vilaĝo fiŝkapti-monopolon en la luara estuaro. La fiŝkaptistoj uzis barketojn kun plata fundo, nomitaj barĝoj; ili fiŝkaptis en Luaro kaj eĉ en la maro, ĝis *La Rochelle*, kaj *Lorient*. Aŭtune, ili kaptis haringojn en la golfeto de *Mesquer*. Komence de la 19a jarcento, la fiŝkaptistoj de Trentemulto, iom post iom forlasis la fiŝkapti profiton al la mara komerco: la apudborda kaj la longdistanca marnavigado. Tiele, dum la 19a jarcento, Trentemulto donis al la maristaro multnombrajn komercajn oficistojn. Paralele, establiĝis ŝipkonstruejoj, kie oni konstruis brigojn kaj trimastajn ŝipojn.

Tradicie, la fiŝkaptistoj loĝis en trietaĝaj domoj, adaptitaj al la riveraltiĝoj. Eksteraj ŝtuparoj ebligis iri rekte al la loĝejoj unuetaĝaj. Je la fino de la 19a jarcento, ŝipestroj (hornkabuloj) konstruigis, cirkaŭ la malnova vilaĝo, burĝajn domojn kun plezurĝardenoj, kie ili kutivis ekzotajn plantojn.

Tiu vilaĝeto inspiris filmistojn:

- *Jean Loup Hubert* filmis en 1990, "La blanka reĝino", kun *Catherine Deneuve*.
- *Claude Chabrol* filmis, en 2005, "La honor-fraŭlino".

Junaj filmistoj, ankoraŭ nun, kreas mallongajn filmojn.


Laŭ FR:Wikipedia.

Ĉefe, moderna ŝipbuso ebligas iri kaj reveni de Nanto ĝis *Rezé* tra la riverego, -10 minutojn proksimume- kaj tiel oni ĝuas tute originalan manieron malkovri tiujn gravajn kvartalojn sur la du flankoj: la industriaj postrestaĵoj de Nanto, la vilaĝo, la monteto *Sainte Anne* kiu entenas la muzeon *J. Verne*, ktp. Eĉ en alia direkto, per tiu rimedo, oni facile povas atingi la domegon «*Le Corbusier*».

Lumeto.



Fotoj : Lumeto



VIA ASOCIO BEZONAS VIN!

Asocioj funkcias per diversaj organizoj. Ĉe SAT-Amikaro estas membroj, kiuj decidas kaj la komitato efektivas la decidojn.

Do estas grave, ke la asocio havu pli da komitatanoj. De kelkaj jaroj ni konstatas, jaron post jaro, ke la komitato malkreskas. Post aprilo 2017, nur unu komitatano agados por realigi decidojn.

Eniri la komitaton estas:

- unu kunsido ĉiudumonte en la sidejo aŭ per retkomunikilo, aŭ telefone. Ne necesas loĝi en

Parizo.

- efektiviĝi la decidojn,

- fari raporton de ĉiu kunsido,

Ju pli la komitato havas anojn, des pli facila estas la laboro ĉar oni povas partigi taskojn.

De nun, ni atendas vian kandidatiĝon. Tiel pri la funkciado vi povos kutimiĝi iom post iom.

Por pli da informoj, kontaktu la asocion (vidu p. 12).

La komitato de SAT-Am.

Kongres-aligilo

En ĉi numero troviĝas la kongres-aligilo. Jen informoj por ĝin uzi.

La aligilo estas sur kunmetita slipo por UNUOPULO aŭ por ARO KIES ANOJ GASTOS STRIKTE SAME.

Sendu tiun aligilon kun via pago aŭ indiko pri ĝiro al (**Minime 30%**)

Ĉeko profite al SATAmikaro Loka Komitato:

CCM Pont saint Martin 000 111 79 801

Internacia IBAN kont-identigilo:

FR76 1027 8361 0300 0111 7980 187

al Agnes LEFEVRE

15 La Brosse Tenaud

44310 Saint Philibert de Grand Lieu
agnes.lefevre0709@orange.fr

Por aliaj demandoj:
colettegranet1939@gmail.com

Adreso de la kongresejo

Lycée La Baugerie,
38 bd des Pas enchantés,
Saint Sébastien sur Loire

Tranoktado ekster la liceo

• Eblas parki ruldomojn (4 aŭ 5) ene de la bela parko de la liceo).

• Junuldomego kaj hoteloj troviĝas sufiĉe apude. Kiuj preferas tranoktadi tie, tiu mem rekte rezervu, la OKK ne zorgas pri.

P

Enhavo

SAT Amikaro + Kongreso,	1414
Ĉef-artikolo de la komitato	3
Kongres-aligo	3
Kongreseto por junuloj	15
Ĉirkaŭ l' kongresurbo : Trentemulo	1, 2
Nia felietono Misŝuoj (12)	12-13
Ideoj / Rakontoj / Informoj	
Moresneto	5
La naturo sub pantoflo...	6-7
Pedagogio	
Kroniko de l' eterna komencanto	4
Slipoj	9-10
Libro-servo	8,11
utilaj informoj	10
Recenzoj	
Libro vivas pli longe...	11
Humuraĵoj-distraĵoj	
Selle-Humuraĵo	4,7
Tra la fenestro	4,16
Vegane kuku	14-15
Te/st/udo \$2	16
Plu moviĝas la Movado -	
Libroj translokiĝas	14-15
Asocio SAT-Am en Kongolando	14-15
Sendado de librojn	14

NIVELOJ

Ĉiuj artikoloj estas akompanataj de lingv-nivela simbolo:



K = Komencantoj

P = Progresantoj

S = Spertuloj

kun asterisko se tradukata franclingven aŭ kun glosaro por lingvaj malfacilaĵoj.

Kongreseto por junuloj, vidu paĝon 15

LA SAGO. CPPAP n° 0317 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication: Serge Sire

Impr. sur papier recyclé par:

L'arbre aux papiers 72100 Le Mans

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto kaj enpaŝiganto: Serĝo Sir'.

Korespondanto/kunordiganto: Lucette Échappé

Redakt-kaj korekt-skipo: Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucette Échappé, Jak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Partoprenis en ĉi numero: Rolando Cuenot, Lucette Échappé (Lumeto), Veronik Girard, P. Grolemond, Stéphane L., Izabel Lamirested', Jak LePuil, Christian Levesque, Lin' el Béziers, Vito Markovo, Guy Martin, Philippe S., Jean Selle, Serĝo Sir', J. Ternant.

Kontribuajoj Contributions

Ĉiam bonvenaj! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Lucette Échappé (Lumeto)

Reto: lasago@free.fr

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuajoj publikigeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

■ de préférence par internet, **textes** en format RTF ou TXT pour un document joint, et **images** en format TIFF, JPEG ou GIF.

■ éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.

■ Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Kiam stoko de libroservo translokiĝas

Vi jam legis en La Sago ke SAT-Amikaro aĉetis du kelojn en domo en la 13a kvartalo de Parizo, proksime de la sidejo.

Eric multe strebis portiu akiri kaj plibonigo de la plankoj. Kun Vjeko ili purigis la kelojn por akcepti la stokon starigita en Thiais. Eric instruis al ni vorton: li instalas novan kardinon kaj du pendserurojn.

La 22an de oktobro, triopo Veronik, Guilherme kaj Guy M, veturis al la garaĝo luprenita en Thiais. Post centoj da skatoloj

enkamionetigitaj, ili surprize konstatis ke unu pneŭmatiko estis grave malŝveligita ... Bonŝance, najbaro informis ilin ke tre proksime pneŭmatikisto troveblas. Reŝveligitaj da aero kaj da energio, la triopo finplenigis la kamioneton kaj retrovis antaŭ la keloj Philippe, Lumeto, Abdel kaj Ghouti. Sesope, ili rapide pretigis lignan plankon kaj enkeligis la skatolojn. Restanta triopo profitis la okazon por vespere translokigi ankaŭ dekojn da skatoloj el la sidejo ĝis la keloj.

Sed ... postrestas duono de la stoko en Thiais kaj kartonoj, paperoj, lignaĵoj kaj bretoj malmuntotaj!

La komitato alvokas membrojn por helpi en la dua kaj lasta translokiĝo por malplenigi kaj purigi la garaĝon en Thiais.

Ĝi okazos **sabaton la 3a de decembro 2016**. Ni petas la bonvolemlulojn kontakti Veronik-on en la libroservo por organizi la taskon.

Telefone: 06 33 21 83 97

Rete: libroservo@sat-amikaro.org

Guy Martin kaj Veronik Girard



En junio 2014, danke al siaj unuaj lernantoj, li kreis 2 novajn klubojn: **Luvunge** kaj **Bukavu**.

En junio 2016, li verkis duan filmon "Dank'al la lingvo" (3 horoj). Estas romano pri la vivo de Jeremie kaj Esperanto. Agrabla rakonto, kiu montras malfacilaĵojn en tiu regiono: la religiojn, la riĉecon kaj malriĉecon.

Se vi deziras monhelpi Jeremie kaj lian klubon kadre de Esperanto Plus: po 60 € semestre kaj jaraliĝo je 6 €. Esperanto Plus transdonas la monon ĉiun sesmonaton al li. Jeremie monate raportas sian agadon pri Esperanto. Por ricevi impostatestilon, sendu aŭ ĝiru la monon al SAT-Amikaro, kiu poste transdonas al Esperanto Plus.

Por scii pli pri Esperanto Plus: <http://esperantoplus.jimdo.com/realigoj/sud-kivuo/>

La sekretario, Philippe S



Asocio SAT-Amikaro Sud-Kivuo en Demokrata Respubliko Kongolando.

Ekde 2012, ni rilatas kun Jeremie Kahindo JACQUES, kiu lernis esperanton per reto ĉar bonŝance, li laboris en retkafejo. En marto 2013, kun geamikoj, li kreis la asocion SAT-Amikaro Sud Kivu en la urbo Uvira, apud lago Tanganjiko. Rapide la asocio kreskis, multaj lernantoj partoprenis. Sed rapide ili konstatis ke Esperanta lingvo ne ebligas gajni monon.

En septembro 2012, Jeremie partoprenis studperiodon en Rumonge (Burundo) kaj ricevis ateston por instrui. Kiam li revenis en sian laborejon, la estro petis de li elekti Esperanton aŭ retkafejon. La morgaŭon li estis forpelita de sia laboro. Ja, li uzis sian tutan tempon por Esperanto; lernis, instruis, serĉis kiel trovi novajn lernantojn, ktp.

En la jaro 2014 oni starigis grupon kadre de Esperanto Plus por monhelpi lin monate. En 2015 Armor Esperanto sendis filmmaterialon (kameraon, komputilon, ktp); SAT-Amikaro monhelpis/as lin por pagi la klasĉambron en lernejoj kaj doni iomete da mono al liaj eksaj lernantoj, kiuj instruas nun esperanton en aliaj urboj de Sud-Kivuo. Ni kreis Paypalkonton ĉar pluraj esperantistoj tra la mondo deziras sendi monon al li sed ne povas uzi Western Union.

En junio 2014, Jeremie kreis filmeton "la infanrajtoj" (30 minutoj) kun siaj gelernantoj por kuraĝigi ilin. La filmo rakontas la devigitan edziniĝon por ebligi la familion vivi.

Sendado de libroj al franc-lingvaj eksterlandanoj.

Denise de 6 jaroj prizorgis tiujn sendojn, Ni dankegas ŝin. Hodiaŭ ŝi devas halti pro personaj kialoj. Do en januaro 2017, ni bezonos trovi iun, por fari tiun agadon.

Jen ĉefaj taskoj plenumotaj:

- rete interŝanĝi kun la ricevontoj por pli bone koni iliajn dezirojn,
- stoki librojn transdonitajn el la sidejo. Kalkulo kun bretaro je 1,5m larĝaj, 2 m altaj. Tio estas breto je 9m longa.
- ĝisdatigi tabelon de la stoko.
- preprari pakajojn kaj poŝte sendi ilin; ĉirkaŭ 10 pakajojn jare. Por tio vi dediĉos ĉirkaŭ 30 horojn jare.
- redakti agadan kaj finanĉan raporteton por la ĝenerala asembleo.

Membroj de SAT-Amikaro jam rilatas kun franclingvaj eksterlandanoj kaj tiel informos vin por sendi librojn.

Kompreneble ankaŭ Denise povos helpi vin je la komenco.

La sekretario, Philippe S

P

Vegane kuiru!

1/2 kafkulero da salo
kk spikoj da petroselo
pipro
1 supkulero da citronosuko
1 dika ajlero
3 supkuleroj da mustardo
3 kafkuleroj da olivoleo
600 g da novterpomoj

- Purigu la novterpomojn: sufiĉas ilin lavi k iom degrati la ŝelon.
- Ilin tranĉu al duonlunoj; konservi en ujo.
- Varmigu la fornon je 200°C.
- En bovlo, miksi mustardon, olivoleon, citronosukon, fajnhakitan ajlon, salon k pipron.
- Verŝu la preparaĵon sur la terpomojn k bone miksu por ĉirkaŭŝmiri.
- Tegu la kuirplaton per

fornopapero. Primetu la terpomojn disigante kiel eble plej multe.

- Enfornigu por ĉirkaŭ 30 minutoj, do ĝis plenkuirado de la terpomoj, turnante ilin je mezotempo.

- Servu varme kun petroselo fajne tranĉita sur la tuto. Bonan apetiton!

Kion ĝi akompanu? Nu povas esti ekzemple vegetaĵa steko el interalie ruĝaj betoj. Sed ĝian recepton vi vidos en onta Sago!

Terpombuĉis
Markovo-Vito 4103



**Plu moviĝas la Movado...
... kaj ties libroj !**



**Kongreseto por infanoj kaj
adoleskantoj**
interne de la
**69a Kongreso
de SAT-Am
15-18 de Aprilo
2017.**



Jes ja, ni gastigos infanojn kaj adoleskantojn!

Ĉu indas nomi tiun renkontiĝon "kongreseto" ? Kiel scii ? Ĉu gravas ?

Ĉu gravas se tiuj familioj neniam antaŭe aliĝis al Sat-amikaro? (Laŭ mi, por pluraj inter ni ne estas zorgoj ...), plie neniam estas tro malfrue por evolui,

2004: en La Roche sur Yon, 15 infanoj partoprenis.

Por 2017, ni konas adoleskantojn kiuj estas pretaj partopreni

Pri la organizado : kompreneble ni ne zorgos pri tiuj junuloj de mateno ĝis vespero; ili havos tempon kun la gepatroj.

La programo por ili ne estas finpreta, tiom pli ke evidente ni ne proponos la samajn aktivaĵojn laŭ la diversaj aĝoj.

Do, se vi estas interesataj por viaj infanoj, aŭ genepoj, najbaretoj, vi povos kontakti nin por havi pli da detaloj.

Lucette Échappé
06 78 97 53 45



Saluton al ĉiuj,

Hodiaŭ mi volas fari al vi konfidencon: Vi ekciu ke, fojfoje, mi legas aliajn esperantistajn revuojn ol *LaSAGo-n*. Certe, ekzistas *La KancerKliniko* aŭ *Sennaciulo* sed ankoraŭ multegaj aliaj troviĝas. Tio montras ke Esperanto estas vivanta, multforma mondo.

Estas io bona en ĉiu Esperantisto, almenaŭ Esperanto, ĉu ne? Tial, mi kelkfoje diras al mi ke, se ĉiuj esperantistoj en la mondo, bonvolus esti man-en-mane, tio iĝus belega rondodanco ĉirkaŭ la Tero.

Ĉu vi opinias mian diron «afabletaĉa», «kanda sukero» aŭ «skoltisma»? Eblas, tamen mi persistas kaj subskribas: mi preferas rigardi kion ni havas komune ol niaj apartaĵojn. Ĉu vi estus vegetarano aŭ vegano, ekologiisto, anarkiisto aŭ socialisto, kelto aŭ skeptikulo, budhismo aŭ globludisto, «burkinisto» aŭ «kontraŭburkinisto, persperantisto aŭ poresperantisto, mi ankoraŭ samopinias ke kiu interesiĝas pri Esperanto, tiu havas, komune kun aliaj Esperantistoj, kelkan humanecan idealon pri egaleco, frateco, sendepende de ĉia ideo pri nacio, religio, aŭ haŭtkoloro.

Tio eble estas despli vera en nia epoko, dum kiu oportuna aspekto de Esperanto

Tra la fenestro

kiel internacia lingvo ŝajnas iluzia fronte al la angla kiu, ĉien, perforte nepriĝis.

Ĉu vi scias ke mi havis okazaĵon helpi junan polan paron, perdiĝinta en la metroaj koridoroj? Mi ja devis uzi la anglan... Se tiuj gejunuloj konis Bjalistokon, se la nomo de Zamenhof iomete signifis por ili, ili tute nesciis pri Esperanto.

Mirinde, ĉu ne?(1)

Ĝis, Dzeka.

Postskribo: Antaŭ nelonge okazis «Alzheimer-tago». Okaze de tio, ĉu necesas memori ke lerni lingvon estas bonega ekzerco por lukti kontraŭ malsana aperaĵo... unu plia bona kialo por lerni Esperanton.

(1) Noto de Serĝo: Mi demandis al Izabelo, ĉu ne plej mirinde estas ke Dzeka kapablis elmontrofenestriĝi por iri vagadi en la metroaj koridoroj... Ŝi respondis ke ja Dzeka havas plurajn ŝnurojn por sia arko....



transsendis Izabel Lamirested'

K*

Lingva helpkadro p.4

Testudo

pseŭdosciencia Bilda Deliraĵo

\$02 far Sir'

P*

Mi ne scias ĉu iam mi kapablos marŝi nur per miaj postkruroj.

Tiuj stultuloj ĉiam forĵetas en mian parkon ajnajn nutraĵojn...

...eĉ se foje veganajn...

...tio stomake pezigas min, kaj igas malfacile loki la projekcion de l' pezocentro* ene de l' apog-bazo*...

...eĉ se la karapaco iom ekvilibras la ventron...

...kaj ĉefe ĉar tio igas la plankon tre glitfaliga*!



*Testudo = tortue / Test-studo = étude par tests.
* pezocentro = centre de gravité.
* apog-bazo (= base d'appui) = polygone de sustentation.
* glitfaliga = par glissade -faisant tomber.